

eLIBRO

*Jean Codjo*

# La pašo senelirejen



INKO

*Jean Codjo*  
**LA PAÏO SENELIREJEN**

**eLIBRO**

*Aranĝis: Franko Luin*

**ISBN 91-7303-112-7**

*inko@omnibus.se*

*<http://www.omnibus.se/inko>*

INKO · SE-13542 TYRESÖ · SVEDIO

AŬGUSTO 2001

**H**odiaŭ estas la bazartago kaj ĉiu Fifamenu\* rajtas provizi sin por la venontaj kvin tagoj, dum kiuj nur ŝafoj, porkoj kaj kokoj laŭvole okupas la bazarlokon, ne kiel vendotaj varoj sed kiel plenrajtaj loĝantoj. Perfekta ordo regas sen ekstera altrudata ordono, preskaŭ ĉiu scias, kio farendas, almenaŭ dum la kvintaga foresto de Fifamenu de la bazono.

Estas ankoraŭ malhele, la kokoj kokerikas, la krio de kelkaj frumatenaĵoj ekaŭdiĝas, Akuavi tute facile povas diveni, kioma horo estas. Biova, la plej juna el ŝiaj ses infanoj ekploras, la ĉiumatena okupo de Akuavi sekve sin anoncas malfacila: Biova surdorse kun unu el la longaj mamoj de la patrino ĉebuŝe. Por sekure kaj komforte resti sur la dorso por mamsuĉi, Akuavi volvasas sin kune kun Biova per relative larĝa ŝtoffadeno, tiel ke unu mamoo direktas sin al Biova surdorse. Gravas zorgi pri Biova, same kiel pri la edzo kaj la aliaj infanoj. Feliĉe kaj eventuale malfeliĉe Akuavi ne devas plenumi ĉiam la noktajn taskojn; laŭ la taskotabelo ŝi rajtas ĝui sian virinecon dum unu semajno monate, la restantaj tri semajnoj estas por la aliaj edzinoj je unu semajno po edzino. Asuka, la potenca edzo, laŭ tradicio neniam rajtas tranokti kun virino dum menstrua periodo; edzino en tia situacio devas nepre

\* *Nu*: tiu afikso aldonita al nomo de lando en la lingvo 'fon' en Benino signifas iun, kiu devenas de tiu lando. Tiel Fifamenu estas Fifame-ano.

aranĝi kun unu el la aliaj, por ke Asuka ne tranoktu sen tia ĝuo.

\* \* \*

\*

Hodiaŭ estas tute speciala tago, la bazaro ne okazos, oni devas ŝanĝi la neŝanĝeblan reĝan moŝton Dahosu. La popolo de Fifame devas fari, kion ĝi neniam faris, ĉar tio neniam necesis kaj urĝis. La naturo ĉiam respektis sian promeson, pluvigustatempe, la rikolto ĉiam bonis, la socia ordo estas bone observata: ĉiu aĵo en la taŭga loko, la reĝo en la reĝdomo, lia hundo apud li kaj respektata de la aliaj hundoj ... ”La hundo de reĝa korto estas reĝo de la aliaj hundoj”, tiel opinias ĉiuj Fifamenu. La junularo ne konas la antaŭulon de sia reĝa moŝto Dahosu, li entroniĝis antaŭ multaj sezonoj kaj multaj forpasoj de lunoj, kiam la avino de Biova ankoraŭ vivis.

\* \* \*

\*

Fifame situas inter rivero malfacile transirebla kaj tre alta montaro; tia geografia pozicio kontribuas al evito de milito fare de fremduloj, kiuj ĝis nun enviis ĝian prosperon. Ĉiusezone, post feliĉa rikolto, la Fifamenu faras ofertan al la dioj, kies beno ebligas sukceson, feliĉon, prosperon kaj pacon.

Biova kreskas, li nun estas dudeksezona knabo kaj nepre devas akompani la patron por lerni, kiel esti viro, alfronti problemojn kaj regi la mondon. Ĉiumatene, kun sako surdorse kaj tranĉilo ĉemane, li paŝas post la patro en la arbaro por inici sin al parolo kaj sekreto de la naturo, alivorte al la vivo.

”Vivi estas kapabli komuniki kun la ĉirkaŭa medio,” admonas ofte la patro.

Post tia inicado, Biova restas ankoraŭ nekompleta viro. La lasta etapo kaj eĉ la plej grava por lia vireco estas la cirkumcido. ”Viro necirkumcidita havas nenian ŝancon ĉe virino, do sekve li neniam havos infanojn,” aldonis la patro. ”Al kio utilas arbo sen frukto?” demandas sin la patro. Biova konscias, ke iun tagon oni devos fortranĉi parteton de lia vira organo kaj tiun momenton li fiere atendas por kapabli senhonte alparoli ankaŭ siajn samaĝulojn.

Momente li ankoraŭ estas infano, sed tamen devas ĉiutage elteni mokojn de siaj amikoj, kiuj jam sukcese pasis tiun gravan vivekzamenon. Antaŭ tiu decida dato, li devas akcepti esti taksata kiel ”atotono” t.e necirkumcidulo. Eĉ knabinoj tute plezure mokas lin. Biova devas elteni ĉion kaj eĉ eviti amikiĝi por ne daŭre esti ofendata.

Lia sola amiko estas ligna fluto, kiun lia avino donacis al li, kaj el kiu li produktas tre belan romantikan melodion; tio kelkfoje atentigas geknabojn pri bona flanko de ”atotono”, kiu havas raran talenton.

\* \* \*

\*

Obube, bela knabino el la vilaĝo, ege admiras Biovan kun lia ”kpete” (fluto), sed tamen hontas proksimiĝi al li pro lia nevireco. Neniu knabino en Fifame tute publike admiras tian knabon, eĉ se li estus la plej talentplena homo. Obube ne rajtas sciigi sian senton por Biova, tio estus grava honto kaj malhonoro por ŝia familio. La povra kaj kompatinda knabino devas momente kontentiĝi per aŭskultado de la muziko de Bio-

va je ioma distanco de li, kun la espero, ke tre baldaŭ ŝi estos la unua elektota amikino de la plej talentplena viro de Fifame. Biova ne ankoraŭ rimarkis la atenton de Obube por li.

La knabinoj de Fifame ofte banas sin en la rivero ĉiutagmeze, en tute kaŝa angulo de ties bordo. "Kiu dio iam ebligos kontakton kun Biova?" demandas sin Obube.

Kompreneble Biova kelkfoje iras laŭlonge la rivero, sed ĉiam evitas la lokon rezervitan por la knabinoj kaj ankaŭ la horon, dum kiu la knabinoj sin trovas ĉe la rivero. Obube devas rezigni, ĉar la ebleco renkonti tute sola Biovan preskaŭ neniam ekzistas. Ŝi devos atendi, ankoraŭ atendi, ĝis li fariĝos viro kaj kun la espero, ke ŝiaj gepatroj komprenos ŝian senton por Biova kaj sekve klopodos ĉe ties gepatroj por tute subtile sciigi, ke troviĝas sur ilia korto 'kokino', kiu plezure bezonus ian 'kokon'. Tia deziro tamen restas nerealisma, ĉar unue ne facile eblas por la gepatroj diveni, kion sentas ilia filino, due Obube certe ne kuraĝos montri sian senton, precipe por iu, kiu ne ankoraŭ estas viro.

Momente en Fifame la temo de ĉiu konversacio estas pri la eksterordinara talento de Biova. Lia patro fiere konscias, ke la cirkumcidata Biova kun tia talento certe furoros ĉe virinoj en Fifame. Ankaŭ Akuavi tre fanfaronas pri tio. Ĉiu pasanta tago estas por Biova espero por la dato de lia akcepto en la socio; malfeliĉe, laŭtradicie la cirkumcidotulo ne rajtas scii pri la dato de tiu ceremonio. Biova devas esti ĉiutage preta kaj tio ankaŭ kontribuas al lia inicado por la vivo: esti ĉiam preta por alfronti neantaŭvidatajn malfacilaĵojn.

\* \* \*

\*

La ĉiusezona festo okazos morgaŭ, tuta Fifame devos denove oferti bestojn al la dio de la rikolto: ĉi-sezone estas sufiĉe de manĝaĵoj ĝis fino de venonta sek-sezono. En tia cirkonstanco la voduo "Dan" estas la plej gratulota dio, sed oni samtempe ankaŭ devas oferti ion al la voduo "Gun", dio de iloj, per kiuj oni laboris dum la tuta sezono. Tia festo ĉiam fariĝas popola, ĉiu kaptas la belan okazon por montri, kion ĉiu kulture kapablas fari, oni dancas, kantas, tamburas, precipe ĉe gejunuloj, kun la espero, ke iu bela knabino rimarkos talentplenan knabon kaj reciproke. La plej taŭga danco en tia okazo estas "toba" aŭ "sinhun" (tamtamo de akvo): dancant(in)o, kiu pli lerte kaj tute harmonie movigas siajn koksojn, pugojn, ŝultrojn, neforgesante esprimi sian tutan korpo-animon kaj ĝojon per tute natura rideto, estas la plej admirata. Ĉiu elektas sian guston laŭ propra kriterio, kelkaj geknaboj direktas siajn rigardojn prefere al la kantist(in)oj, tamburfrapantoj ... ĉiuokaze tia festo restas la sola okazo por socia kunvivado kaj daŭrigo de la tradicio.

Biova ne partoprenas en la festo; lia patro ne malpermesis, sed li pro honto preferas resti hejme.

\* \* \*

\*

La sekvantan tagon frumatene iu sin anoncas. Kutime Azuka pli longe restas enlite, sed tiun ĉi matenon li tuj ellitiĝis por ricevi la gaston. Ili tre mallaŭte parolis kaj post kelkaj minutoj ili adiaŭis unu la alian. Biova tre scivolis — tiun maljunulon li neniam antaŭe vidis, — pri kio damne ili parolis? — sed demandon li ne rajtas fari.

Azuka fariĝas iom stranga poste. Biova tuj alkuras sian pa-

trinon por informiĝi pri la hodiaŭa frumatena vizito, sed nenion konkretan li aŭdas de ŝi.

”Kial damne ankaŭ mia patrino ne konas tiun maljunulon?” demandas sin Biova. ”Oni certe provas ion kaŝi al mi”, li respondas mem al sia demando. ”Ĉu eble alproksimiĝas la ... hm ... ĉu li estus la fortranĉisto de vir ... ne, li tamen ne havis tranĉilon ĉemane, eble li kaŝis ĝin en sia poŝo ... ”; tiom da demandoj li faras al si mem sen konkreta respondo.

La etoso ĉiutaga de la domo renormaliĝas, sed daŭre Biova ne ĉesas fari al si zorgojn pro la kaŭzo de la vizito de iu, kiun li antaŭe neniam vidis.

La ĉiutagaj okupoj okazas normale, sed tute neatendite en la posttagmezo Azuka petas Biovan akompani lin en la arbaron. Kutime tia akompano okazas frumatene. Li obeas kaj denove kun sia sako surdorse kaj sago en la dekstra mano ili survojiĝas unu post la alia. Ili paŝas trans la arbaro, kiun ili kutime vizitas, daŭrigas la vojon ĝis alia pli densa arbaro.

Biova ne kuraĝas fari demandon pri la celo de tiu longa vojaĝo, sed je kelkaj centoj da paŝoj for de loko tute ĉirkaŭata de tre gigantaj arboj, li ekaŭdas voĉojn de homoj. Tiuj voĉoj devas esti nur de knaboj, knabinoj neniam rajtas eniri tian sekretan lokon. La ritmo de la piedpaŝo de Biova ne plu estas regula, liaj gamboj ektemas, la kontakto de la piedplando kun la tero ne plu estas sentebla, la bato de la koro fariĝas nenormala; tamen li devas montri kuraĝon, li neniam rezignas, li estas virseksa kaj devos baldaŭ tion pruvi. Li jen kaj jen direktas sian rigardon inter siajn gambojn por esti certa, ke sia virorgano ankoraŭ estas tie, sed ĝi estas preskaŭ nevidebla kaj eĉ netuŝebla. Li havas la impreson, ke ĝi malaperas



pro timo, sed iel ĝi devos aperi, por ke Biova fariĝu finfine viro.

Ju pli ili plupaŝas, des pli la voĉoj de knaboj en la sekreta loko laŭtiĝas. Kvankam Biova pli kaj pli timas, li tamen emas tuj renkonti la aliajn knabojn por informiĝi pri la kialo de ilia internigo en tiu stranga loko. Ĝis nun Asuka ne alparolis Biovan pri la kialo de tiu longa vojaĝo; li eĉ aspektas iom stranga, ĉar kutime li rakontas ion pri la rolo de viro en la homa socio, pri la rilato inter viro kaj virino, pri la virto de la vivo, ktp. Sed hodiaŭ li aspektas zorgema kaj tio ankaŭ kontribuas al la timo de Biova.

Asuka ŝvitas, kvankam freŝa vento blovas en la arbaro, sed li tamen daŭre tiel paŝas, ke la knabo Biova devas kelkfoje kuri por redukti la distancon inter ili. La tuta etoso dum tiu vojaĝo estas nekutima, Asuka ne atentis pri Biova, li eĉ antaŭpaŝas, eĉ tre rapide, tiel ke Biova havas la impreson, ke lia patro volas lasi lin. Tre verŝajne li tiel lernas fari decidon, pripenzi, agadi, sen nepra ordono de iu ajn. Proksime de la sekreta internulejo, soldata kanto ĥore kaj tute laŭte aŭdiĝas:

*”glegbenu no yavi a,  
e no sien ta,  
e no tun afo te”\**

La patro de Biova subite ekzumas la kanton, ĉiu vera viro en Fifame iam lernis tiun kanton, ĉar tiu kvazaŭa monaĥejo estas deviga transiro al vireco. Tiun kanton Biova neniam antaŭe aŭdis. Nu, la kialo de la vojaĝo preciziĝas en lia kapo; ”se mi ne rajtos plori, mi do devos elteni doloron pro la fortranĉo

\* Laŭvorta traduko: ”vera viro neniam ploras, li devas esti obstina, li devas esti kuraĝa”

de parto de mi mem”, diras Biova. Hodiaŭ devus esti la tago de vireco, kiun li fiere delonge atendis. ”Mi baldaŭ estos vera viro” aŭdiĝas ia tikla voĉo en Biova. Ĝojo kaj samtempe timo ekturmentas lin: ”Ĉu mi perdos multe da sango? Ĉu mi sukcese eltenos la tutan vivekzamenon? Kiom da horoj mi restos tie ĉi? ... ” Biova faras al si multajn demandojn sen taŭga respondo. Nun li staras ĉe la pordo de la vivo kaj certe ne plu rajtas rifuzi. La sola solvo estas eniri.

Sed ĝis nun li ankoraŭ ne konis la knabojn, kies voĉojn li aŭdas. Verŝajne ili konas unu la alian. Asuka atendas dum kelkaj minutoj ĉe la pordo por reciti el la gorĝo kelkajn frazetojn preskaŭ neaŭdeblaj. Finfine li malfermas la pordon el palmaj branĉoj kaj enirigas unue sian filon. Biova ĉirkaŭrigardas; per tute surprizplenaj malfermitaj okuloj li rekonas samaĝulojn inter la multnombraj knaboj, kiuj kolektiĝas en la mezo de la korto de la monaĥejo. Kiel soldatoj ili staras, kapo malantaŭen klinita, la gamboj tute streĉitaj kun la brakoj kvaŝaŭ gluitaj al flanko de la ventro kaj la brusto. Preskaŭ tute nudaj, la knaboj surhavas nur foliojn de bananarbo por iel kaŝi la pugon kaj la virorganon. Ili kantas je la ritmo de la paŝkadenco, frapas forte per sia propra mano la brustkorbon por montri, kiel fortaj ili estas.

La ceremonio okazos morgaŭ frumatene, ĉeesto de gepatroj estas malpermesata, la knaboj estas en nova mondo, nova lernejo kun nova majstro. Oni lasas ilin resti inter si por babili, rakonti, projekti, sugesti, konsili, ktp. Ili nun bone konscias pri la ekzameno, pri la konsekvenco de eventuala nesukceso pro iu timema knabo inter ili. Ĉiuj konscias pri la avantaĝo de tiu ceremonio rilate al la vivo en la socio. Ĉiu el ili

havas sian planon, kun kiu virino edziĝi, kiom da edzinojn havi, al kio utili en Fifame ...

”Morgaŭ estos la tago de la tago!” krias subite Dodji; ”mi eĉ ne ĝemos pro doloro” fiere aldonas Kuĝega. Biova elprenas la lignan fluton el sia sako kaj ekproduktas kortuŝajn belajn sonojn, kiuj onde transflugas la arbaron ĝis oreloj kaj koroj, kiuj pretas aŭskulti tiajn melodiojn. Birdoj kolorriĉaj, ĉiuspecaj belaj bestoj en la arbaro subite kolektiĝas kaj tute harmonie akompanas la melodion emocio-plenan el la fluto de Biova. Por esprimi sian kuraĝon li ekkantas popolan kanton:

*« ... ado gbemi o  
 aho o  
 mede ma do gbe o  
 aho o  
 ye ni gbo  
 aja e ba hwe kpo  
 aja na yi xwe  
 ajinaku mo no gon daatonhe ... »*

La kanto temas pri iu, kiu ne timas tion, kio okazas. Egale al tio, kio okazas, li triumfe revenos en la domon de sia patro. Li nomas sin ”ajinaku”, hipopotamo, kaj estas tiel forta, ke nenio povos lin timigi.

Kun malfermitaj buŝoj la aliaj knaboj restas senvortaj kaj miras pri la talento de la ĵus alveninta knabo. Biova agrabligas la tutan vesperon, dum kiu la majstro de la monaĥejo bele rakontas pri la vivo de la praavoj. Ĉiuj forgesas la okazontaĵon de la venonta tago kaj iom post iom, unu post la alia

ĉiuj endormiĝas. Antaŭ la enlitiĝo Biova deziregas, ke antaŭ la sekvonta mateno li jam tute senkonscie fariĝu vera viro. Ĉu li timas pro la doloro, tamen delonge antaŭvidita?

\* \* \*

\*

Baldaŭ aperos la suno, aŭdiĝas jam ĉiuspecaj krioj de bestoj, estas ankoraŭ malhele. Biova estas ankoraŭ dormema, li iom malfrue enlitiĝis la antaŭan tagon. Hunnon, la majstro de la monaĥejo, delonge estas veka kaj jam plenumas sian taskon.

”Ho ve! tiu generacio estas vere kuraĝa” rimarkigis triumfe Hunnon. Unu post la alia la dormantaj knaboj estas tirataj al alia pli sekreta loko je kelkdek paŝoj de la dormejo por la cirkumcido. La ceremonio sukcesas, ĉar neniu dormanta knabo aŭdas ĝemon aŭ krion de alia, ne pro manko de doloro, sed pro promeso de la antaŭa vespero.

Dum la venontaj kvar tagoj ili devas teni la gambojn dise unu de la alia, por ke la sangplena organo ne tuŝu la dikan muskolon de la gambo. En la korto estas botelo da ruĝa oleo kun plumo, per kiu oni oleumas la pinton de la peniso por povi pisi. En la monaĥejo ili restos for de la gepatroj dum proksimume du semajnoj, dum kiuj ili lernas multajn aferojn pri la vivo en la homa socio. La lasta etapo de la ceremonio okazos en publika korto de la vilaĝo.

\* \* \*

\*

Akuavi delonge ne vidis sian filon, sed ŝi tamen ne plendas pri tio. Biova forestas de dektri tagoj. Oni anoncis, ke morgaŭ ĉiuj Fifamenu devos kolektiĝi sur la publika korto por festi la

alvenon de la novaj "glegbenu". Akuavi scias, kion tia anonco signifas. Ŝi pli kaj pli pretiĝas por ricevi eventualajn gastojn, kiuj alvenos speciale por gratuli. Ĉiuj en la vilaĝo estas nervozaj, eĉ knabinoj, ĉar estos okazo direkti sian senton al unu el la "glegbenu". Obube certe ne maltrafos tian okazon. Samtempe ŝi timas, ke estos multaj konkurantinoj por forpreni Biovan.

Meze de la korto staras fajro kun flamo, simetrie kun staranta arbo je ĉirkaŭ 30 piedpaŝoj kaj de alia punkto, kie staras la novaj "glegbenu". La nudaj knaboj havas ĉemane sep ŝtonetojn po knabo. La ceremonio konsistas el forkuro ekde la startpunkto, poste salto trans la fajro kaj finfine, kun fermitaj okuloj, ĵeto de unu ŝtoneto kontraŭ la staranta arbo. La proceduro tiel daŭriĝas ĝis ĵeto de ĉiuj sep ŝtonetoj. Ne temas pri konkuro inter la knaboj, sed pri kiom da fojoj ĉiu knabo trafas la starantan arbon. Kiom da fojoj ĉiu knabo trafas la arbon, tiom da edzinoj li havu en sia vira vivo.

Biova ne estas sufiĉe lerta kaj trafas nur unufoje la arbon. Certe bona novaĵo por Obube, sed malbona por la gepatroj. Biova ne rajtos plurfoje edziĝi, li sekve ne havos grandan familion kun multaj gefiloj. Oni tamen povus fari specialan peton ĉe la voduo Dan, por ke ĝi rekonsideru la situacion de Biova. Sed momente la peto ne urĝas kaj oni povos prokrasti tian debaton al alia dato.

Sed inter la knabinoj grandiĝas la seniluziĝo, ĉar la ŝanco esti unu el la elektotinoj de la talentplena Biova malpligrandiĝas.

Sekvas la lasta kandidato por ĵeto de la sep ŝtonetoj kontraŭ la staranta arbo. Dodji estas sufiĉe granda kaj lerta. Li

sukcesas trafi sepfoje la arbon kaj fariĝas la plej ŝanchavanta knabo ĉe la ĉeestantaj knabinoj.

La ceremonio finiĝas per longa alparolo de la reĝa moŝto de Fifame. La knaboj denove kolektiĝas ĉirkaŭ la fajro, kelkaj el ili ankoraŭ ŝvitas, sed tamen devas stari apud la flamo por aŭskulti la lastan konsilon de Dahosu. La alparolo en tia cirkonstanco ĉiam okazas en tre trankvila kaj malbrua etoso por povi auskulti la reĝon. La multnombraj edzinoj de la reĝo anoncas la alparolon per kanto por laŭdi unue la reĝon kaj poste ĉiujn Fifamenu. Prenante la parolon la reĝo atentigas pri la rolo de viro en la socio kaj pri la konsekvencoj de la nerespekto de tiu rolo. Por atesti pri la enkapiĝo kaj perfekta regado de tio, kion ili lernis en la arbaro, la knaboj soldatpaŝas je la ritmo de la kanto, per kiu ili laŭvoĉas la rolon de viro:

*"tocico, jonuhihen, vodusisen,  
azon mi ton we  
wanyiyi nu azon, wanyiyi nu nozo,  
azon mi ton we  
tovijotoviyiyi ... "*

*(landoprotektado, zorga okupiĝo pri ino, venero de Voduo,  
tio estas nia tasko,  
laborema, amema  
tio estas nia tasko  
esti vera civitano ... )*

Ĥore kunkantas la ĉeestantoj, dancas kaj aplaŭdas.

La festo fariĝas vere popola, ĉiu rajtas eniri ĉiun domon por manĝi, trinki, babili pri ĉio kaj pri nenio, kapti la okazon

por pli proksime rigardi la bravulon, eĉ paroli kun li, alivorte ĉiu havas apartan kialon por tia vizito sen invitpermeso. La manĝaĵo de la bravulo estas tute aparta, por li estas speciala telero kun rostita kokaĵo kaj krome rizo. Neniu alia rajtas kunmanĝi; Biova tamen ne malsatas pro tre ĝojiga emocio, li nun estas viro, povas alparoli homojn, deziri akompani inojn, rompi multajn koroj per melodio de sia 'kpete' ...

Li nun surmetas belan ĉemizon el ledo de tute blanka ŝafo, la felo sur la ledo estas tute pura kaj alloga. Biova jam dum la ceremonio antaŭ la reĝo freneze turmentigis la kapon de multaj inoj per sia talento, ĉiu el la knabinoj ĉeestintaj al ceremonio certe dezirus konvinki viziti la domon de Biova post la ceremonio, ne nepre por manĝi, sed precipe por esti pli proksima al la eksterordinara knabo. Diligenta kaj obeema li estas, kaj tio estas precipe la kialo de la fiero de liaj gepatroj.

\* \* \*

\*

En la domo de Dodji estas preskaŭ neniu gasto, dum ĉe Biova abundas ankoraŭ homoj kaj tio jam provokas ĵaluzan senton. Dodji petas sian patrinon, ke ŝi permesu al li kunporti sian manĝon al Biova por tie kunmanĝi pro la tiea etoso. Biova ankaŭ ĝojas, ke lia amiko dum la vivekzameno en la arbaro vizitas lin, ili nun povas kapti la okazon por paroli pri ĉio de la vivo: knabinoj, amo, geedziĝo ... Ĉiu el ili deziras koni la sekreton de lia sukceso:

Biova: "Kiel vi tiel bele sukcesis trafi per la sep ŝtonetoj la arbaron?"

Dodji: "Vi scias, ke miantaŭ nia interniĝo ĉiam emis ĵeti por ĉasi birdojn."

Biova: "Nu, espereble tiel vi fariĝas tiel lerta, sed tamen vi devas havi ian sekreton, konfesu!"

Dodji: "Kontraŭe, estas vi, kiu abundas je talentoj."

Biova: "Ne troigu! mi ege deziras esti kiel vi, granda kaj forta."

Dodji: "Ne moku min! Ĉiuj en Fifame envias vin."

Biova: "Ĉu? Kial?"

Dodji: "Kiom da Fifamenu scipovas produkti tiom da belaj melodioj el tute simpla lignaĵo?"

Biova: "Hm ... tio tamen estas nenio eksterordinara."

Dodji: "Vi eble estas blinda por ne rimarki la knabinojn dum nia prezentado al la reĝo."

Biova: "Kio okazis?"

Dodji: "La bela filino de mia najbaro fiksitis dum la tuta ceremonio sian rigardon sur vin."

Biova: "Kiel ŝi nomiĝas?"

Dodji: "Obube."

Biova: "Hm ... Dodji, konfesu, ke ŝi plaĉas al vi, ĉu?"

Dodji: "Tute ne, mi nur rimarkis, ke ŝi daŭre rigardas vin."

Biova: "Nu ... vi rimarkis, ĉar vi ankaŭ rigardis ŝin."

Dodji: "Do, en ordo! hm ... mi nur ... hm ... ne! jes mi efektive rigardis ŝin."

Biova: "Ĉu vi ... hm ... iel amas ŝin?"

Dodji: "Ne! tute ne! hm ... vi pravas, ŝi estas vere bela."

Biova: "Alparolu viajn gepatrojn, eble ili jam ..."

Subite eniras Akuavi por esti certa, ke ili bone manĝas. Ili tuj ŝanĝas temon de la konversacio. Akuavi estas unu el la plej feliĉaj patrinoj dum tiu tago, ŝi ĝojas, ke nenio malfeliĉa okazis al ŝia ĉarma filo, ŝi daŭre petegis diojn de la arbaro, por ke ĉio glate iru dum la interniĝo en la arbaro. Finfine la



dioj certe akceptis ŝian peton: ŝia filo estas nun viro kaj tre baldaŭ abundos vizitoj en ŝia domo de gepatroj de la plej belaj knabinoj, ĉu por peti eventualan ligon kun ŝia familio, ĉu por simple viziti kune kun filino, en la espero, ke Biova mem rimarku ĉion. Ŝi ĉirkaŭbrakas plurfoje sian filon kaj fiere ŝercnomas lin "sunu glegbenu" (forta viro). Al Dodji ŝi finfine direktas:

Akuavi: "Dodji, ankaŭ filo mia, kiel ĉio okazis en la arbaro?"

Dodji: "En ordo."

Akuavi: "Dankon al voduo de la arbaro! Nun mi denove lasas vin trankvila, por ke vi daŭrigu vian konversacion."

Ŝi eliras kun rigardo tute fiksita al la du knaboj kaj murmuras: "Vi estas vere 'sunu glegbenu'."

Estas ankoraŭ sur la korto multe da gastoj, kiuj deziras saluti Biovan. Laŭtvoĉe unu el la gastoj krias: "Akuavi, kie estas la plej grava homo en la domo?"

Tute ŝerce ŝi respondas: "Vi ankoraŭ devos longe atendi por povi vidi la nunan reĝon de Fifame"; el la homamaso aŭdiĝas alia voĉo: "Ni volonte longe atendos, ĝis kiam li aperos".

Trinkante kaj babilante oni diskutas pri ĉio en la vilaĝo: rikolto, fiŝkaptado, infanoj ...

\* \* \*

\*

Neniu en Fifame malsatas, ĉiam abundas manĝaĵo, Fifame nu malofte malsanas, sekreton de la naturo ili konas kaj sekve harmonias kun ĝi. Al tiu popolo mankas nenio, sed ĝis kiam? Eble ĉiam ili restos feliĉaj aŭ verŝajne tre baldaŭ enkondukigos la unua viruso-detruanto, kaj ĝis kia grado ĝi detruos,

tion, neniŭ povas antaŭdiri. Pri kia detruo temos? Ĉu la arbaro? oni povos replanti arbojn; — ĉu la rivero? la pluvo rekreos ĝin; — ĉu la dombestoj? ili denove rekomencos la bredadon; — sed kian detruon damne okazigos la viruso?

\* \* \*

\*

Biova pli kaj pli krestas kaj tute harmonias kun la normoj de sia socio. Li ege ŝatas kapti fiŝojn, ludi sian 'kpete' ĉe la bordo de la rivero, dancigas ĉiujn je la melodio de tiu ligna muzikinstrumento.

Iun "vodugbe"\* Biova post longa kaj teda laboro de la semajno intencas ripozi apud la rivero. Li unue 'kpeteumas' kaj tre malrapide li endormiĝas, kiam subite la tero ektemetas, aŭdiĝas bruego kiel krio de freneza elefanto, la ĉielo rapide kovriĝas de nigra flamo.

Regas konfuzo ĉe la tuta enloĝantaro de Fifame, la bestoj kuras kaj flugas en ĉiujn direktojn, la kokoj ekkokerikas meze de la tago, estas vere misfunkcio de la tuta socia ordo. Neniŭ kuraĝas halti por fari demandon pri kio okazas, kelkaj eĉ opinias, ke verŝajne la ceremonio por la inicado de la knaboj ne glate okazis kaj sekve la dioj pro tio freneze koleriĝas.

En tia situacio neniŭ trankvile povas proponi, kio farendas, la nura reago estas trovi rifuĝejon, kie sekurigi sin. Vera viro ne plu diferenciĝas de virino, li nun ne plu kapablas protekti ŝin, ĉiu kuras dise por sin savi. Eĉ la reĝo devas forlasi la domon kaj multnombrajn edzinojn por trovi rifuĝejon ie.

En tiu konfuzo Biova ne scias, kion fari. Li kaŝas sin sub arbeto kun la espero, ke iam la tuta afero normaliĝos. Sed tute

\* dimanĉo en la moderna vivo

strange, la bruego pli kaj pli alproksimiĝas kaj la tremo de la tero pli intensiĝas.

”Ĉu eble la fino de la mondo?” demandas sin Biova, ”sed pri tio neniu praavo rakontis, eĉ ne la reĝo,” li timeme aldonas. Biova provas gardi sian trankvilon, sed finfine li preskaŭ senkonsciiĝas kaj svenas, kiam li havas la impreson, ke la strangaĵo alproksimiĝas pli kaj pli al li.

Ĉio trankviliĝas, la krioj de birdoj ne plu estas aŭdeblaj, regas preskaŭ enfera silento, Biova rekonsciiĝas, tamen kun daŭre fermitaj okuloj. Kiom longe daŭris la apokalipso? Certe unu jarcenton, konsiderante ĝian konsekvencon sur la medio. Biova fine malfermas la okulojn kaj je tre granda surprizo vidas gigantan domon sur la rivero, kun kameno, el kiu eliras nigra fumo.

”Kion oni tiel kuiras en tiu flosanta domo?” miras Biova. Ie sur la domo estas homo tute stranga, kiu rigardas lin. ”Verŝajne tiu homo estis en la fajro, kaj nun bezonas helpon por fuĝi; li estas bruligita, sed ne ankoraŭ karbigita, li eble spiras, mia patro verŝajne povos helpi lin.”

Biova gestas per la mano, por ke li tuj venu. ”Hm ... eble la fajro forbruligis liajn okulojn” pensas Biova. ”Estas tamen nekonsilinde alproksimiĝi al tiu varma domo, en kiu certe devus esti hommanĝanto.”

Biova tuj kuras hejmen por anonci la novaĵon al la tuta vilaĝo kaj por peti helpon. La reĝo ordonas, ke oni laŭtvoĉe anoncu al la tuta Fifame pretiĝi por helpi kaj eventuale militi:

”Kin go! kin go! eliru! ĉiuj eliru kun armiloj kaj medikamentoj kontraŭ bruligita vundo por unue forĉasi la hommanĝantojn kaj savi la bruligitajn homojn, kiu ankoraŭ vivas.”

La tuta vilaĝo eliras kaj amase en grupo ĉiuj direktas sin — la inoj malantaŭe — al la bordo de la rivero. Je kelkaj centoj da piedpaŝo videblas pli kaj pli parte bruligitaj homoj, tute ruĝaj kaj blankaj.

”Hm ... kia eksterordinara fenomeno!” diras la reĝo. Subite li ordonas, ke oni alproksimiĝu al ili kun tranĉiloj ĉemane por helpi ilin batali kontraŭ la hommanĝanto, kiu intencas forbruligi ilin ĉiujn. Alproksimiĝante al la giganta flosanta domo, la bruligitaj homoj ektimas kaj vigle kontraŭstaras per longaj bastonetoj, el kiuj eliras bruega flamo, kiu tute strange mortigas kelkajn Fifamenu. Tuj la reĝo ordonas, ke la tuta vilaĝo retretu, por ke li bone analizu la situacion. La konsilantaro de la reĝo kolektiĝas kaj deduktas, ke fakte ne temas pri homoj en angoro, sed pri fremduloj, kiuj decide intencas batali kontraŭ ni. ”Kiel vera Fifamenu, ni devas kontraŭstari.” opinias iu konsilanto. La reĝo zorgeme pripensas, karesas sian barbon kaj trovas la opinion de la konsilanto malsaĝa:

Dahosu: ”Ne saĝas kontraŭstari iun, kiu tute evidente estas pluroble pli forta ol ni. Li kapablas forpreni vivon de iu ajn Fifamenu, eĉ je distanco de miloj da piedpaŝoj. Ni prefere estu kunlaboremaj por ekscii lian sekreton.”

Konsilanto: ”Vi pravas, eble ili estas dio, ĉar tian blankan homon neniu el ni antaŭe vidis. Mia avo iam rakontis, ke vodu Dan estas blanka virino kaj tre ĝentila. Eble Dan persone deziras viziti nin.”

Ĉeestanto: ”Sed li ne bezonas nin mortigi dum sia vizito.”

Konsilanto: ”La flamo trafis kelkajn el ni, eble ĉar ili estas malpuraj kaj ne plu rajtas vivi kun ni.”

Dahosu: ”Ĉiokaze ili estas pli fortaj ol ni, sed tre verŝajne ili ne estus vodu Dan, ĉar Dan estas parte serpento kaj

vestas sin en blanka vestaĵo. Neniu el ni povus senĝene aserti, ĉu Dan mem havas blankan haŭton aŭ ne.”

Ĉeestanto: ”Tiuj malĝentilaj homoj certe ne parolas nian lingvon.”

Konsilanto: ”Unu el niaj infanoj povus lerni ilian lingvon. Mi proponas Biovan.”

La kunsido tiel finiĝas kun la aprobo de la ideo de la konsilanto. Oni sendas iun kontakti la patron de Biova. Li ne rajtas rifuzi disponigi sian filon por la bono de la vilaĝo.

La sekvantan tagon devos okazi pli granda kunsido de la tuta vilaĝo por decidi pri la konduto rilate al la blanka homo.

”Blam grun bada bada bam bam, aŭskultu! ĉiuj aŭskultu! morgaŭ matene ĉiuj devos kolektiĝi sub la giganta arbo sur la publika korto por diskuti pri nia lando! kin go kin go! tiel decidus reĝa moŝto Dahosu.»

\* \* \*  
\*

Estas neniu konversacio en la vilaĝo, kiu ne pritraktas la nunan situacion. Multaj el Fifamenu trovas en la vizito de la bruligitaj homoj komencon de nova vivo, eble pli konvena ol la ĝisnuna. Kelkaj tamen ege timas kaj tute ne komprenas, kial la supozata protektanto devus unue pafmortigi la protektaton. Ĉiuokaze la ĝenerala kunveno baldaŭ okazos, kaj ĉiuj scios, kian konsilon la dioj donos tra ilia reĝa moŝto Dahosu.

Pro la katastrofo lamas la normalaj aktivecoj en la vilaĝo, ĉiuj unue deziras kompreni, neniu plu atentis al la normoj de la socio, ĉiuj timas, pripensas, kelkaj faras proponojn neakcepteblajn, regas preskaŭ senordo. Sed baldaŭ, tre baldaŭ ĉiuj direktos sian rigardon al la buŝo de la reĝo, certe el lia

buŝo eliros la konvena solvo, ĉiu devos teni sian spiron por aŭskulti la lastan vorto rilate al la destino de la vilaĝo.

Oni povus veti, ke neniu sukcesis fermi la okulojn dum tiu nokto. Fifamenu neniam antaŭe militis, ili sekve neniam havis soldatojn, kies ĉefa tasko estus protekti la vilaĝon kontraŭ eksteruloj. Ili do neniam antaŭvidis tian situacion, Fifame estis vere pacema vilaĝo, almenaŭ ĝis la malfeliĉa okazintaĵo.

\* \* \*

\*

Baldaŭ ekheliĝas, preskaŭ ĉiuj surpiedas, pretiĝas por la asembleo por palavri, proponi, trovi solvojn, alivorte decidi por Fifame. La parolanta tamtamo ĉe la reĝo ekrezonas, tio estas signo de baldaŭa eliro de la reĝo, ĉiuj devas kolektiĝi antaŭ lia alveno sub la palavro-arbo bone purigita por la cirkonstanco. La virinoj de la reĝa korto anoncas la alvenon de la reĝo per laŭdoj, kantoj preskaj psalmaj. Tre malrapide paŝas Dahosu al la korto kun sia konsilantaro malantaŭe, unu el ili tenas ombrelegon kaj provas protekti la reĝon kontraŭ la radioj de la suno, kiu tamen ne ankoraŭ aperis. En la konsilantaro estas ankaŭ la fratino de la reĝo, samtempe tradicie onklino de la tuta vilaĝo.

Ĉiuj jam troviĝas sub la arbo antaŭ la alveno de la reĝo, oni akceptas lin per popola kanto, li kapgestas, levas sian magian bastoneton super la kapo por indiki, ke ni ankoraŭ vivas kaj certe daŭre vivos. La bardo de la vilaĝo akompanas la kanton por laŭdi la kvalitojn de Fifamenu:

*” ... Sunu glegbenu, sunu akonkpikpan  
hwelinu, aganu*

*vi ji do toxwe mo no hon jo hwe do  
awada kpekpe no fun zo a ... ”*

Temas pri laŭdo de kuraĝa kaj forta viro, kiu neniam trompas sian hejmlandon per fuĝo pro malkuraĝo. Li finas la laŭdon per proverbo: ”papilieto neniam alproksimiĝas al flamo”. Fifamenu estas la flamo, al kiu neniu alia kapablas alproksimiĝi.

Ĉiuj ĉeestantoj fiere aŭskultas la laŭdon, sed tio ne tute forprenas la timon pri la hieraŭa situacio. Ne longe for de la kunvenejo ankoraŭ staras la flosanta domo kun ĉiama nigra fumo el ties kameno.

Dahosu devas tre pripense gvidi la debaton, ĉiu vorto devas esti bone analizata por ne perdi tempon, kiu en Fifame neniam mankis ĝis nun. Unu el la konsilantoj devas unue klarigi la celon de la kunveno, kiun ĉiuj jam scias, sed tamen tute certe alimaniere:

Konsilanto: ”Kara popolo! karaj geaŭskultantoj, hieraŭ alproksimiĝis papilieto al nia flamo, kiu malfeliĉe ne kapablis forbruligi ties flugilon. Male ĝi sukcesis estingi parton de nia flamo. Kia mondo! Kiam io tio jam okazis sur tiu tero? Se ni tamen ne tuj ion faras, la papilieto certe ankoraŭ sukcesos estingi la tutan flamon de Fifame. Tiel ni certe devas malaperi kaj forlasi nian riĉan teron, kiun ni de niaj praavoj heredis. Nun urĝas tuj ion fari, sed kion?”

Tuj post la alparolo regas granda silento, oni eĉ povus aŭdi flugantan muŝeton, ĉar la solvo de tia enigmo estas preskaŭ netrovebla: ”awadakpekpe no fu zo”\*. Kia strangaĵo !

El la ĉeestantoj venis kolerplena kaj tremanta voĉo: ”Ni ne

\* papilieto povas alproksimiĝi al flamo

rajtas kapitulaci antaŭ tiuj barbaroj, ni batalu ĝis la lasta vivanta Fifamenu”; alia simila voĉo aldonis: ”Ni estas ĉe ni”. De ĉie el la publiko venas diversaj opinioj, plej ofte de viroj. En tia konfuzo leviĝas Huefa, la fratino de la reĝo, por postuli silenton.

Huefa: ”Militi kaj gajni kontraŭ tiuj homoj ne dependas de kiom da homoj kaj glevoj Fifame disponas, sed precipe de nia inteligenteco kaj ruzo. La nuna situacio eskapas al iu ajn logikeco. Kiu inter ni antaŭe povus imagi, ke papilieto kapablas estingi flamon? Tiuj homoj certe scipovas ion, kion ni en Fifame ne ankoraŭ scias. Estus prefere saĝe, ke ni konatiĝu kun ili kaj spione komprenu ilian sekreton por povi kapabli plenumi ankaŭ nelogikan taskon: kiel gajni sen pravi! Necesas pro tio sendi unu el niaj filoj lerni ilian lingvon por kapabli komuniki kun ili; tiel li revenos kun ilia sekreto, kiu certe nin helpos por protekti nian vilaĝon. Ni nepre devas konatiĝi kun tiuj homoj, ili certe estas pli inteligentaj, se ili povas konstrui gigantan domon, mortigi malamikojn je granda distanco, konstrui parolantan skatolon, kiu sen influo de iu ajn kapablas produkti melodion kiel ĉe la fluto de Biova ... ”

La ĉeestantoj trovas la ideon sufiĉe ruza, sed interpretas ĝin kiel ideon de virino sen defendo.

Asuka: ”Via moŝto onklino de Fifame, vi certe pravas, sed kio post tiu longa strategio restos kiel valoroj homaj kaj kulturaj por ni?”

Huefa: ”Ĉu vi opinias, ke per la hieraŭa situacio niaj valoroj ne ricevis gravan ŝokon? Ĉio tamen ne estas ankoraŭ for, tiu strategio certe helpos nin konservi kelkajn el la valoroj.”

Konsilanto: ”Via pledo estas sufiĉe konvinkinda, mi tute samopinas; tamen mi timas, ke nia filo, kiu devos lerni ilian



lingvon, poste komplete kaj negative metamorfoziĝos kaj sekve ne plu revenos al ni.”

Huefa: ”Prave! Sed tio estas nia sola alternativo; en la mala okazo ni perdos la batalon kaj devos forlasi nian riĉan teron.”

Regas silento, ĉiuj rigardas unu la alian kaj ne povas kompreni, ke ili nenion kapablas kontraŭ la invado de ilia vilaĝo, kvankam abundas energio en ili por batali. Preskaŭ plorante Akuavi petas pri la rolo de la reĝo en tia kontakto.

Huefa: ”Mi mem nenion povas antaŭvidi; sed povos esti, ke ili tiel nin influos, ke ni preskaŭ ĉion perdos.”

Ĉeestanto: ”En tiu okazo, ni prefere ekbatalu por esperi gajni aŭ perdi!”

Huefa: ”Iu ajn engaĝigota batalo en la nuna cirkonstanco kontraŭ ili estas anticipe perdita. Ni estu saĝaj!”

Huefa tiel pledas sufiĉe detale por pacema konduto, ke ankaŭ Dahosu akceptas ŝian proponon. ”Dio ĉiam konsentas kun tio, kion opinias virino,” li diras.

\* \* \*  
\*

Por la unua fojo Fifamenu devas kalkuli je disponiĝo de tempo. La malamiko estas jam ĉe la pordo kaj ili devas rapide agi por eviti la forpason de aliaj Fifamenu. Temas nun pri tio, kiun sendi kiel spionon, kiu estu la lernonto de ilia lingvo. La reĝo jam havis en la antaŭa tago ideon pri Biova. La tuta ĉeestantaro samopinias pri la elekto, ĉiuj akordiĝas pri la diligenteco de Biova. Por liaj gepatroj Biova tiel fariĝas heroo, kiu protektos la vilaĝon kontraŭ iu ajn malamiko.

Tiel la popolo akceptas kontraŭvole la eniron de la fremdulo en Fifame. La fremdulo iel aspektas ĝentila, li havas tre

eksterordinarajn aĵojn, per kiuj li tre allogas fascinojn ĉiujn Fifamenu. La reĝo ricevis muzikskatolon kiel donacon, li devas pro tio premi sian dikan fingron sur paperon, sen scii la signifon de tiu ago, Biova eklernas la blankulan lingvon, ĉiuj ekmiras pri la ŝajna pacema konduto de la fremdulo.

\* \* \*  
\*

Tiel dum cento da ŝanĝiĝantaj sezonoj vivas Fifamenu, ili plibonigas siajn produktadon kaj rikoltojn, sed devas pro tio daŭre protekti sin milite per pli efika armilo kontraŭ siaj najbaroj, kun kiuj ili tamen havas komunan amikon, la blankan fremdulon. Jaroj post jaroj, generacioj forpasas, valoroj ankaŭ forpasas, posteuloj apenaŭ scias ion pri la sekreta arbaro, regas pli forta ĵaluza etoso, forta sento de propra posedaĵo per ĉiu ajn maniero: mensogo, forpreno de vivo, ŝtelado, koruptado ...

Eĉ la nomon de la lando oni ŝanĝas, ĝi nun nomiĝas Bigloĉeme\*. Dahosu lame adaptiĝas al la situacio, li baldaŭ devas perdi sian postenon, se li ne pretas tute forgesi la praavajn valorojn, permesi al alia okupi la tronon kontraŭ daŭra ricevo de donacoj, de fascinaĵoj el la blanka lando. Biova bone scipovas la lingvon de la fremdulo, por kiu li eĉ laboras kiel tradukisto. Alia rolo de li krom la tradukado estas ĉion fari por adaptigi kaj konvinki la tutan vilaĝon al forĵeto de la praavaj valoroj kaj akcepto de tiuj el la fremda lando. Li perfekte plenumas la taskon.

\* *Bigloĉeme*: altrudita nomo de la iama Fifame post la perforta eniro de la fremdulo. Laŭvorte la vorto signifas: 'ĉio en mia sako (poŝo)', alivorte 'ĉio por mi sola'.

\* \* \*

\*

La popolo de Bigloĉeme devas elekti novan reĝon, necesa kondiĉo por daŭre ricevi donacon el la blanka lando. Alia kondiĉo estas ebligi aŭ permesi al tiuj, kiuj deziras kandidatiĝi por la reĝa posteno, sin anonci. Dahosu tiel devas batali por konservi sian tronon; tradicie neniu alia ekster la reĝa familio rajtas kandidatiĝi, sed tiu reĝa familio perdis delonge sian influon.

Unu el la kandidatoj nomiĝas Ĉeĝenabi\*, riĉa homo kaj la plej ŝatata de la fremdulo. Lia propra domo estas tiel giganta kiel la iama flosanta domo sur la rivero, kiun la fremdulo kunportis en la iaman Fifame. Sinjoro Ĉeĝenabi promesas paradizon por ĉiuj Bigloĉemenu, kondiĉe, ke ili elektas lin kiel la novan reĝon. Pro tio li disdonas fascinajn aĵojn ĉiuspecajn: muzikskatolojn kiel la iama donaco de la fremdulo por la reĝo Dahosu, manĝaĵon el la blanka lando ...

Estas tute certe, ke Ĉeĝenabi estas la plej riĉa inter la kandidatoj, kaj sekve estas tiu, kiu kapablas nutri la tutan vilaĝon sen laboro. Ĉie en Bigloĉeme oni disdonas reklambroŝurojn okaze de la baloto, sur kiuj bela foto de Ĉeĝenabi estas presita. La balotkampanjo de Ĉeĝenabi ĉiam allogas preskaŭ la tutan vilaĝon, dum Dahosu sensukcese provas savi kelkajn valorojn per simplaj konsiloj konservi lin, por ke ili ne ĉion perdu: "Nur mi povas garantii internan pacon al vi" kriegas Dahosu.

Granda parto de lia konsilantaro nun troviĝas ĉe la alia kandidato.

\* Ĉeĝenabi: la nova reĝo de Bigloĉeme. Laŭvorte: 'nur la mia devas esti bone kuirita', alivorte: 'nur mi rajtas al avantaĝo'.

”En kiu lando de la mondo regas paco kun malplena ventro?” demandas Ĉeĝenabi.

”Nenie” respondas la multnombraj ĉeestantoj al lia kampanjo.

Ĉeĝenabi: ”En kiu lando abundas manĝaĵo sen mono?”

Ĉeestantoj: ”Neniu.”

Ĉeĝenabi: ”Kiu el la multnombraj kandidatoj povas garanti riĉecon al vi?”

Ĉeestantoj: ”Vi ... .iiiiiiii !

Ĉeĝenabi: ”Karaj gefratoj de Bigloĉeme, mi ĝojas, ke vi ĉiuj nun konas la homon, kiu taŭgas por vi. Vi ĉiuj scias, ke mi estas la sola amiko de la blankuloj. Ili estas ege riĉaj kaj eĉ jam promesis helpi min disponigi al mia popolo ĉion, kion ĝi bezonas: monon! Tuj post mia elekto mi disponigos al ĉiu familio belan domon kiel la mian. Miaj amikoj disponigos al ni bovaĵon kaj ŝafaĵon el ilia lando. Iliaj bestoj neniam malsanas. Neniu en Bigloĉeme plu bezonos labori por sin vivteni, ĉar ĉio ... ”

Antaŭ la fino frazo la tuta ĉeestantaro aplaŭdas pro ĝojeĝo por danki al Ĉeĝenabi pro lia bonkoreco. Ili dum minutoj skandas la sloganon de Ĉeĝenabi.

”Bigloĉeme, paradizo! Bigloĉeme, paradizo! Bigloĉeme, paradizo! paradizo! paradizo! Nur kun Ĉeĝenabi!”

Ĉeĝenabi: ”Mi dankas vin! Mi nur deziras emfazi, ke kun Ĉeĝenabi ĉio staras je la dispono de ĉiu Bigloĉemenu.”

La festo daŭriĝas post la alparolo, oni disdonas monon, dancas, trinkas ... La elekto de Ĉeĝenabi estas sendube certa.

\* \* \*

\*

Pasas multaj semajnoj, monatoj kaj jaroj, la lastaj pledantoj por la tradicio mortis, Ĉeĝenabi fariĝis la nova reĝo de kelkaj monatoj, kaj ekzistas certe kelkaj Bigloĉemenu, kiuj ankoraŭ esperas, ke la nova reĝo finfine instalos la paradizan socion. Ne plu ĝustatempe pluvas, ne plu abundas ĉasaĵo pro forigo de la arbaro, regas malsato en ĉiuj familio, sed Ĉeĝenabi tre lukse rekonstruigas la reĝan domon, en kiu li nun loĝas. Ĉiu konsilanto disponas apartan belan kaj luksan domon kaj provizon financan por superflujaj elspezoj.

Dodji, la amiko de Biova, estas la konsilanto pri virinaj aferoj. Li havas sep edzinojn kun multnombraj gefiloj. Ĉe li hejme preskaŭ ĉiu rajtas opinii krom virinoj. Li bategas la virinojn, kiuj kuraĝe kontraŭopiniis, senĝene amoradas kun alia knabino, kiu tre plaĉas al li, ekster la oficialaj edzinoj, filino lia ne rajtas diskuti kun la filo, egale kiom aĝa li estus.

Morgaŭ devos okazi konferenco pri la virina situacio en la mondo. Bigloĉeme honore ricevis la avantaĝon aranĝi tiun konferencon pro la tiea kvazaŭa respekto de virinaj rajtoj.

Dodji, kiel konsilanto de tiu departemento, devas malfermi la konferencon. Li pro tio devas bone flegi sian eksteron, surmeti belajn vestaĵojn por doni bonan impreson pri Bigloĉeme, lando de respekto de virinaj rajtoj. En la iama publika korto, kie staris la palavro-arbo\*, nun anstataŭe staras giganta konferencejo, de kiam oni elektis Ĉeĝenabi por gvidi la landon.

\* *Palavro-arbo*: arbo, sub kiu oni 'palavras'. Tipa afrika esprimo, kiu signifas lokon, kie la tuta vilaĝo en la iama neskriba epoko en Afriko kolektiĝis por debati pri ĉio, rakontadi ...

La partoprenantoj venas el diversaj landoj, eĉ el la blanka lando. Tiel Bigloĉeme fariĝas centro de la tero dum la daŭro de la konferenco. Jam dum la antaŭa vesperon alvenis granda parto de la partoprenantoj. Ili tranoktas en la plej belaj domoj, kiuj devus esti, laŭ promeso dum la balotkampanjo, domoj de ĉiuj Bigloĉemenu. Nun tiuj domoj estas tro belaj por tiu popolo, kies infanoj eĉ ne rajtas ludi en ties ĉirkaŭaĵo: la kialo estas tutsimple eviti tedi eventualajn fremdulojn, kiuj dum ilia vizito en Bigloĉeme tie tranoktas. Por la popolo de Bigloĉeme fakte ne temas pri domo laŭ la familia vidpunkto, sed tutsimple pri tranoktejo de Ne-bigloĉemenu.

\* \* \*

\*

Iom post iom ĉiuj Bigloĉemenu ekkonscias pri siaj forrabitaj rajtoj: ili ne plu rajtas iri ien ajn, eĉ alproksimiĝi al la belaj domoj, kiujn Ĉeĝenabi siatempe promesis al ili. Se iam iu el ili vere dezirus tranokti dum kelkaj horoj en tia domo, li devus elpoŝigi monon por ĝui tiun lukson. Sen mono ili ne plu rajtas esti vera Bigloĉemenu, ili eĉ pli kaj pli forlasas siajn pravaĵajn domojn, ĉar mankas pli kaj pli loko por iliaj bestoj kaj infanoj.

De la alveno de la fremdulo ne plu sufiĉas scipovi la lingvon kaj naskiĝi en Bigloĉeme por esti Bigloĉemenu. La nuna pruvo de identeco ĉefe dependas de papero, kiun ĉiu vera Bigloĉemenu devas posedi. Ili pro tio instaliĝas en la arbaro, kiun la evoluo de la urbo-centro certe baldaŭ atingos. Jam oni faligas multajn jarcentaĝajn arbojn nur por provizi la centron de Bigloĉeme, kaj precipe la blankajn amikojn de Ĉeĝenabi.

Estas nun lia vico esti dankema al homo blanka, per kies helpo li fariĝis reĝo.

Ĉio tute glate kaj bele funkcias por ĉiuj en Bigloĉeme, krom por la veraj Bigloĉemenu. Se ili jam perdis la valorojn hereditajn de siaj praavoj, ili nun ne havas la eblecon adaptiĝi al la nuna ordo: ili ne estas sufiĉe riĉaj por sendi siajn filojn al nuna lernejo kaj sekve preskaŭ neniam adaptiĝos al la realeco imponita. Ili estas homoj fremdaj kaj sen legitimilo en sia propra vilaĝo.

\* \* \*  
\*

La koko delonge jam kokerikis, sinjoro konsilanto pri virinaj aferoj prepariĝas, lia alparolo estas jam surpapere preta, li scias, kion endas diri kaj kion surmeti. La elekto de taŭga kaj konvena vestaĵo por tia cirkonstanco turmentas lin. "Ĉu 'danĉiki' aŭ 'agbada' por tamen montri mian emon por afrika kulturo." li demandas sin.

Dodji estas perfekta kopianto kaj malestiminda imitanto de blanka vivmaniero, li neniam surmetas 'danĉiki' nek 'agbada'. Li ĉiam opinias, ke tiaj vestoj nur taŭgas por necivilizitaj Bigloĉemenu. Sed li nun intencas esti vera Bigloĉemenu por siaj gastoj el foraj landoj. Li fine surmetas 'agbada', tre longan robon el multaj metroj da ŝtofo kun ornamaĵoj. Tute majeste li eniras la konferencejon, ĉiuj aplaŭde kaj ĝoje leviĝas, li mangestas por peti, ke ili sidiĝu. La partoprenantino el la blanka lando alparolas tiun sidantan apud ŝi el la flava lando: "hm ... li estas vere bela afrikano".

La koferenca halo estas plena de homoj; por la cirkonstanco ĉeestas artistoj, kiuj en siaj kantoj ege laŭdas la kvaliton de

la gastiganto. Dodji devas nun alparoli por oficiale malfermi la konferencon:

”Sinjoro reĝa moŝto de la pacema lando de Bigloĉeme, karaj gastoj el ... hm ... pardonu: karaj gegastoj el foraj landoj, mi bonvenigas vin ĉiujn en mia bela kaj pacema lando. La elekto de mia lando por gastigi tiel gravan konferencon ne estas rezulto de hazardo: Bigloĉeme estas efektive la paradizo surtere, kie ekzistas neniu diferenco inter viro kaj virino, kie oni vere respektas la rajtojn de homo, precipe tiujn de la virino, la patrino de la homaro. Vi certe jam rimarkis kaj povos konfirmi tion, kion mi diras. Neniu virino en Bigloĉeme plendas pri io ajn, krome ŝi estas fakte la decidantino de ĉio en Bigloĉeme kaj ... ”

Je tiu lasta frazo leviĝas ĉiuj por dum longa minutoj aplaŭdi kaj laŭdi la virinojn de Bigloĉeme. Sinjoro konsilanto pri virinaj aferoj petas silenton kaj daŭrigon de sia alparolo:

”La leĝo en Bigloĉeme nek toleras nek permesas edziĝon de viro kun pli ol unu virino. Nia devizo estas: unu familio – unu edzo – unu edzino. La lerneja edukado de Bigloĉeme estas tute senpaga por virinoj: cent procentoj de la inoj en mia lando vizitas lernejon. Kiu diras, ke en nia mondo estas nur patriarka socio? Ĉiuokaze pro la elekto de Ĉeĝenabi, Bigloĉeme delonge ĉesis esti patriarka socio. Mi esperas, ke tiu ĉi konferenco helpos vin ĉiujn profiti de la modelo de Bigloĉeme. Kuraĝon kaj pacon al vi!”

Aplaŭdoj, krioj ĉiuspecaj kaj kantoj sonas de ĉie en la konferenca halo por akompani la sinjoron konsilanton pri virinaj aferoj forlasi la halon. La alparolo ege fascinis la partoprenantojn, la delegitino el la ruĝa lando emocie leviĝas kaj krias: ”Jen bela lando!”



\* \* \*

\*

Tiaj renkontiĝoj pri ĉiuspecaj mondaj temoj ofte okazas en Bigloĉeme en la nomo de Bigloĉemenu, sed tre for de ili.

La modelo de la sistemo ege fascinas la tutan mondon, eĉ la blankan. Eĉ premioj venas de tia lando por Bigloĉeme, t.e. por Ĉeĝenabi. Lia domo fariĝas pli kaj pli bela kaj luksa. Tiujn domojn Ĉeĝenabi kaj liaj konsilantoj havas kiel personajn posedaĵojn en ĉiuj anguloj de Bigloĉeme. La domoj plej ofte ne enhavas enloĝantojn, kvankam la normalaj Bigloĉemenu devas daŭre batali kun siaj ŝafoj kaj kokoj por preni kelkajn kvadratmetrojn por povi dormi nokte.

Daŭre abundas helpo el la blanka lando por Ĉeĝenabi, tiel ke taŭga loko por konservi la helpon mankas. Li decidas konservi parton ĉe tiu, kiu tamen sendas al li la helpon. Li ekhavas la ideon konstruigi ion similan kiel tion de Bigloĉeme en la blanka lando. Finfine li posedas la plej belajn domojn en tiu lando. "Ŝajnas, ke tia domo en la blanka lando nomiĝas kastelo." flustras Dodji al reĝa moŝto Ĉeĝenabi. Ĉiuj konsilantoj de Ĉeĝenabi ekkaresas la ideon havi por si mem ion tian en la blanka lando. "Tiel niaj filoj povos facile studi tie," opinias iu konsilanto.

Ĉeĝenabi: "Jes vi pravas, mia plej maljuna filo estas obee- ma kaj diligenta. Li tute kapablas posteumi min kiel reĝo en Bigloĉeme. Li nun devas lerni kiel regi laŭ blanka maniero"

Konsilanto: "Reĝa moŝto, vi vidas, ke mi ĉiam havas belan ideon."

Ĉeĝenabi: "Jes konsilanto, vi scias, ke mi ĉiam admiras mian konsilantaron. Estas efektive pli prudente por ni kaj por la estonto de nia filoj kaj nepoj ekhavi tiajn posedaĵojn en la

blanka lando. Ni kaj niaj posteuloj eĉ fariĝos rajte civitanoj de la blanka lando.”

Dodji: ”Kia genia ideo! Mi nun havas ĉirkaŭ tridek filojn, ĉu estus sufiĉe da loko por ili en la blanka lando?”

Ĉeĝenabi: ”Ne temas fakte pri loko, sed pri mono.”

Dodji: ”Sed reĝa moŝto, la reĝo de la blanka lando kaj tiu de la flava promesis sendi alian monton da mono. Estus multekoste por ili pro la sendokosto, se ili nur enmetas ĝin en nian malgrandan domon, hm ... kiel ĝi nomiĝas ... ”

Ĉeĝenabi: ”Banko?”

Dodji: ”Jes, banko! Ni devas ŝpari la sendokoston por Bigloĉeme.”

Ĉeĝenabi: ”La reĝo de la blanka lando estas bona amiko mia. Li certe konsentos. Li eĉ deziras, ke mi donacu al li la lokon, kie staras nia jarcentaĝa arbaro apud la rivero. Estas ridinde, ke iu deziras havi tiun lokon. Ĝi ne utilas al ni, do ni perdas nenion donacante ĝin al li. Nu, temas fakte nur pri interŝanĝo de peto kaj intereso inter li kaj mi.”

Dodji: ” Ho ve! Miaj tridek infanoj baldaŭ loĝos en la blanka lando”.

\* \* \*  
\*

Hodiaŭ estas denove ”vodugbe”, ripoztago por ĉiuj Bigloĉemenu. La semajno fariĝis iom teda por Dodji pro la konferenco. Sur la korto li kuŝas en hamako el ligna fadeno. Ĉirkaŭ li estas tri el liaj sep edzinoj, kiuj provas tute lerte masaĝi lian ŝultran muskolon. La malgranda Kossi, lia plej juna filo, staras apude.

Dodji: "Kara mia 'Glegbenu', ĉu vi ĝojos, se vi loĝos en la sama lando kiel blankulo?"

Kossi: "Kie ili loĝas? Ĉu ĉio en lia lando estas blanka?"

Dodji: "Kompreneble? Tie estas nur puraj aferoj, eĉ la aero estas pli pura ol tiu de Bigloĉeme.»

Kossi: "Ĉu mi ankaŭ fariĝos blanka kaj pura?"

Dodji: "Jes, mia filo!"

Kossi: "Ĉu patrinoj ankaŭ kunvivos?"

Dodji: "Hm ... ne estas sufiĉe da loko por inoj."

Kossi: "Kiel domaĝe!"

Ablavi, la patrino de Kossi, silente flustras al sia filo: "Esperable vi ne forgesos min, kiam vi blankiĝos."

\* \* \*  
\*

La vivo en Bigloĉeme tiel daŭras, ŝajne tute normale, sed fakte nenio normala por Bigloĉemenu. Ĉiu dekomence batalis, luktis kaj kontribuis al la decido pri elekto de la nova ordo. Kvankam netaŭga al la tieaj valoroj, la tiamaj Fifamenu kun ties reĝo Dahosu kontraŭvole akceptis la kondiĉojn preskaŭ imponitaj kaj eniron de la 'bruligita homo', kiu, tute neatendite, kondukis tre ĝentile: ĉiuspecaj donacoj al reĝa moŝto Dahosu, promeso instalii socion pli paradiza ol la antaŭa ... Ili tiel sin engaĝis kun ĉiuj Bigloĉemenu en tia procezo kun klare definita celo.

Malfeliĉe, eĉ ilia spiono Biova ne plu konsciis pri la tasko antaŭa kaj kune difinita kaj sekve ne kapablis informi sian popolon, kiu tute fiere vane atendis sian filon. Bigloĉeme perdis sian filon, siajn valorojn, kulturon kaj eĉ sian teron. Pli danĝere estas, ke ili ankaŭ perdis sin mem: la kapablon re-

komenci, konscii pri si mem, pri la avantaĝo de sia medio kaj ĉirkaŭaĵo, observi taŭgan valoron ... ĉio tio estas eterne forviŝita.

En la nuna ĝangalo ne nur rajtas regi la plej forta, sed precipe la malvirta homo, la mensogisto, la trompisto, la ŝtelisto ... La nenormala fariĝis nun normo. Meze de la batalo montriĝis, ke la bruligita homo ne estas la ĉefa malamiko de Bigloĉeme, sed precipe Bigloĉemenu mem. Ili neniam satas, neniam konscias, ke alia Bigloĉemenu povus ankaŭ ekzisti, ili nur manĝas, daŭre manĝas ĝis eksplodo de sia ventro. Se ili tamen kontentiĝus eksplodi solaj, la aliaj Bigloĉemenu ĝoje kontentiĝus pri la restoj el iliaj eksploditaj ventroj por povi rajti daŭrigi la vivon, eble kun eventuala espero rekonstruigi la iaman veran paceman Fifame; sed malfeliĉe, eĉ la multnombraj dioj ne staris je ilia flanko: la eksplodo forblovis la tutan vilaĝon, tutan kulturon kaj valoron, alivorte preskaŭ ĉion.

\* \* \*  
\*

Kion oni povus atendi aŭ esperi de tia tereno, kie estas nur enfosigitaj minoj? Neniu alia planto sukcese kreskos sen antaŭa elfosiĝo de la minoj. Se tamen en tiu minigita kampo oni ankoraŭ enfosigas aliajn minojn, nu, neniu espero ekos por rekreskigi pliajn plantojn sur tia tereno. La elirejo el la fermita cirklo pli kaj pli mallarĝiĝas, dum la enirejo plilarĝiĝas.

En la enfera cirklo ĉiuj interkonsentas por fondi ian sindikaton de politikistoj por defendi la proprajn avantaĝojn. La situacio de Bigloĉemenu ĉiam restos la sama, ĉu kun Ĉeĝenabi aŭ kun Dodĵi, ĉu kun iliaj filoj aŭ nepoj. Ili ĉiam konsen-

tas pri la minimumo por ĉion forrabi. Okazas kelkfoje miskompreno inter ili, sed tio nur celas ŝajnan funkciadon de la sistemo por atesti diversecon de opinioj en Bigloĉeme, unu el la gravaj kondiĉoj, imponataj de la fremdulo por rajti al donacoj. En Bigloĉeme regas efektive demokratio, sed tiu de Nebigloĉemenu.

[www.omnibus.se/inko](http://www.omnibus.se/inko)

**ISBN 91-7303-112-7**